


# Madrida Bitoteko proponas ret-bibliotekan kunlaboron

Hispana Esperanto-Federacio komencis antaŭ du jaroj ampleksan projekton, kies celo estas konservi la komunan kulturan heredaĵon de la esperantistoj. Por tiu celo oni kreis "bitotekon", kiu unue estos deponejo por dokumentoj de la Biblioteko Juan Régulo kaj eldonaĵoj de aliaj iberiaj bibliotekoj, kaj poste povos esti deponejo por la tuta esperantistaro. Kompleta informo pri tiu temo estas en artikolo de Ana Manero, kiun oni povas vidi en retopaĝo de ***Libera Folio***, adreso: **http://www.liberafolio.org/2011/madrida-bitoteko-proponas-retbibliotekan-kunlaboron**

**La Projekto Bitoteko fontis el duobla konstato: unue, ke la Biblioteko Juan Régulo Pérez ne povas multe pli kreski ene de la mallarĝaj limoj de la asocia sidejo kaj due, ke la hodiaŭaj teknologioj, ebligas plenumi la duoblan celon de ĉiuj Esper-anto-bibliotekoj: faciligi la aliron de la uzantoj al iliaj dokumentoj kaj konservi nian komunan kulturan heredaĵon. Dum la manko de spaco, draste limigas la eblecon de bibliotekoj kreskadi per tuŝeblaj materialoj, la proponita solvo donas la ŝancon disponigi en la reto parton de la jamaj dokumentoj – tiujn ne plu sub aŭtor-rajtoj – kaj ankaŭ tiujn kreitajn rekte en bita formato.**

**Paralele, do, al la plua mastrumado de sia, ni diru, "tradicia biblioteko", HEF proponis la kreadon de kroma "bita biblioteko". La iniciatintoj de tiu projekto konsciis pri tio, ke multaj similaj projektoj certe jam aperis en la movado: kial ne, do, labori kune kun aliaj samideanoj? La nunaj teknikaĵoj tion ebligas. Ĉu ne oportune plene malfermi la projekton al aliaj institucioj, tiel ke la Bitoteko estu konsiderata projekto ne de HEF, kvankam iniciatita de ĝi, sed de la tuta esperantistaro? Oni konsideru, ke multaj E-bibliotekoj kaj asocioj havas valoran bibliografian materialon indan je konservado kaj diskonigo, kaj ke per kunlaboro oni povus kompletigi kolektojn –ofte disajn kaj mankajn, ĉefe se estas malnovaj eldonaĵoj– kaj proponi al interesatoj kaj esploristoj kiel eble plej ampleksan kaj riĉan datumbankon. Unika deponejo de komune konstruita bibliografia kolekto konsiderinde faciligos la trovon de Esperanto-dokumentoj kaj donos koheran bildon de ampleksa bibliografia produktado**

**Projekto tia estas vera defio de kunordigo, kaj –ĉar tiel ampleksan – konsilindas realigi ĝin paŝo-post-paŝe, per fiksado de sinsekvaj malgrandaj celoj, kies plenumado konduku nin al la fina realigo de la projekto. Fina celo estas konstrui inter ĉiuj, laŭ profesiaj kriterioj, kiel eble plej ampleksan bibliografian datumbankon kapablan konkurenci kun similaj profesie kreitaj bitdeponejoj, kompletigante tiel la diversajn kolektojn de ĝisnunaj eldonaĵoj. Por tio oni bezonas plenumi ĉi partajn celojn: unue, konservi bitigitajn dokumentojn jam ekster aŭtor-rajtoj troviĝantajn en esperantistaj bibliotekoj aŭ asocioj kaj doni aliron al ili; due, konservi kaj alirebligi la ĉiam pli abundajn denaske bitajn dokumentojn; kaj trie, engaĝi aliajn bibliotekojn, asociojn kaj esperantistojn, kiuj provizu nin per dokumentoj kaj laborforto. Certe grupoj kun longa historio disponas abundon da interesa bitiginda materialo. Kaj certe ankaŭ ekzistas samideanoj al kiuj plaĉas la ideo kunlabori en projekto kies sukceso plifaciligos la aliron de esploristoj kaj aliaj interesatoj al la valoraj havaĵoj de nia kulturo. En ĉi bitdeponejo trovu sian lokon, do, same bitigitaj dokumentoj kiel dokumentoj origine bitaj, el kiuj la plej abundaj specoj sendube estos gazetoj, libroj, fotoj, videoj, sonregistroj, kaj gazet-eltondaĵoj, sed kie poiome kolektiĝos ankaŭ mapoj, partituroj, afiŝoj, arkiv- dokumentoj kaj alispecaj kuriozaĵoj.**

**La projekto bezonas homojn, kiuj laŭ siaj ebloj kaj ŝatoj kunlaboru en la necesaj taskoj. Estos bonvenaj ankaŭ helpaj komputilistoj kaj tradukantoj. Sed, ĉefe, oni bezonas scii ĉu iuj jam entreprenis similan projekton kaj ŝatus kunigi fortojn. Nepras granda laboro de kunordigo kaj interkonsento pri pluraj aferoj, kaj tiucele oni devos krei forumon, kiu permesu al la kunlaborantoj facilan interkontakton. Kaj certe estas jam multaj bitigitaj dokumentoj dise en multaj lokoj, eble ne en la plej konvena formato, sed kiuj povus jam provizore aliri la kolekton. Eventuale estonte oni povos anstataŭigi ilin per pli kvalita bitigaĵo.**

**Kiel oni povas vidi, temas pri tre ampleksa kaj ambicia projekto, kies realigado postulas multe de laboro, sindediĉo kaj entuziasmo. Kunlaboro estas ĝia esenco. Bele, se multaj samideanoj emus kunkonstrui tiun esperantan Bitotekon!**